Jarraporto por Grupo Esperantista de Trondheim, 2012

Okazintaĵoj

Klubaj kunvenoj

Dum 2012 okazis entute 15 ordinaraj klubkunvenoj, 1 jarkunveno, 2 festoj (Ĝardena kaj Zamenhofa) kaj 2 estraraj kunvenoj.

En la ordinaraj klubkunvenoj partoprenis inter 4 kaj 10 membroj, meznombre 6,9 (meznombre en 2011: ankaŭ 6,9; 2010: 7,1; en 2009: 6,5; en 2008: 6,6; en 2007: inter 6 kaj 7 personoj; en 2006: iom malpli ol 7). Ĉiuj kunvenoj kaj festoj okazis hejme ĉe membroj.

Por la plimulto el ordinaraj klubkunvenoj oni preparis temojn, pri kiuj respondecis specifaj personoj, ĉu estis prelegoj, prezentoj aŭ io alia. Dume aŭ poste okazis konversacioj pri la temoj, kaj ĉiam okazis ankaŭ kafklaĉo post la oficiala programo. Tiel la kunvenoj ebligis al membroj praktiki la lingvon. Komence de la kunvenoj Judith Parelie Abrahamsen prezentis netradukitajn Pondus-striojn kaj malnetajn tradukojn de Pondus-strioj por diskutado en la klubo, celante ontan eldonon. La ordinaraj klubkunvenoj estis studkunvenoj kaj do subvenciitaj de la ŝtato pere de la studorganizo Næring og samfunn. Temoj en 2012 estis:

- *Pri la studasocio.* Herman Ranes prezentis la studorganizon Næring og samfunn, kaj ni diskutis la studplanon.
- *Ni tradukas Pondus-on.* Judith Parelie Abrahamsen preparis striojn por tri apartaj kunvenoj.
- *Posedi katojn*. Jardar kaj Judith Abrahamsen montris bildojn, filmetojn kaj siajn katojn, kaj rakontis pri katposedado.
- *Tradukado*. Torstein Kvakland preparis taskojn.
- *Reinhard Mey*. Jardar Eggesbø Abrahamsen prelegis pri tiu germana kanzonisto, kaj ni spektis multajn kanzonojn.
- *Barato*. Ulf Stenhaug rakontis kaj montris bildojn de sia vojaĝo.
- *Olav Ullestad*. Kjell Heggvold Ullestad prelegis pri sia avo.
- *Ludkartoj*. Jørgen G. Bosoni prelegis pri la diversaj tipoj de kartaroj.
- *Vojaĝo al Hanojo kaj UK*. Herman Ranes rakontis kaj montris bildojn de sia vojaĝo.
- *Kiel eviti la metiistan kaptilon? Rakonto pri domplibonigа projekto.* Torstein Kvakland kaj Christian Fossen rakontis pri siaj spertoj.
- Filmoj: *The Universal Language* (dokumentfilmo) kaj *Conlang* (novelfilmo). Judith kaj Jardar Abrahamsen spektigis.
- *La Centra Oficejo*. Kjell Heggvold Ullestad iam laboris tie, kaj prezentis la aferon.
- *Turkio*. Ulf Stenhaug respondecis pri kunveno dum kiu ĉiuj preparis prelegeton pri io rilata al Turkio.

Varbado, kursado kaj informado

Ne okazis kursoj en 2012, ne okazis aktiva varbado, kaj ne estis mencioj de GET en la gazetaro.

Membrostatistiko

Fine de 2012 GET havis 15 membrojn (2011: 17; 2010: 19; 2009: 20; 2008: 21; 2007: 23; 2006: 25).

Partopreno en naciaj aranĝoj

GET-anoj ne partoprenis naciajn aranĝojn en 2012. La planita seminario de NEL prokrastiĝis ĝis februaro 2013.

Partopreno en internaciaj aranĝoj

Unu GET-ano, Herman Ranes, partoprenis la Universalan Kongreson en Hanojo.

Vortara laboro

Kunordiganto pri la vortara laboro de GET estis ankaŭ ĉi-jare Herman Ranes. En 2012 ne okazis laboro pri la nova vortaro, ĉar ne ekzistas responsulo pri la praktika laboro. NEL petis al GET diskuti la aferon.

Interreta aktivado

GET havas retpaĝon kun la kunvenprogramo. Jardar Eggesbø Abrahamsen redaktis kaj tiun paĝon kaj la paĝaron de NEL. Li ankaŭ administris la jenajn retpoŝtajn listojn: GET-lista, NEL-diskut kaj NEL-inform. Judith Parelie Abrahamsen kunadministris la paĝaron de NJE. Je la jarfino membris 21 en la retpoŝta listo de GET (23 en 2011 kaj 2010, 25 en 2009 kaj 2008, 26 en 2007, 24 en 2006). Ne ĉiuj membras en la klubo. Dum 2012 sendiĝis 68 mesaĝoj per la listo.

Biblioteko

La kluba biblioteko ankoraŭ restas en skatoloj hejme ĉe Herman Ranes. Oni ne registris pruntedonojn en 2012.

Aldone al sia biblioteko la klubo posedas kelkajn librojn vendeblajn, kiujn la klubo transprenis donace de NEL en 2008 okaze de la malfondo de Eldonejo Esperanto en 2007.

Arĥivo

La kluba arĥivo restas hejme ĉe Torstein Kvakland kaj Christian Fossen.

Pasporta servo kaj aliaj vizitoj

Gastigantoj de Pasporta Servo en Trondheim estas Ulf Stenhaug kaj Torstein Kvakland/ Christian Fossen. Polino Halina Radoła el Gostyń, kiu estis en Trondheim por viziti sian nevinon, ĉeestis dum unu klubkunveno, kaj ankaŭ tranoktis unu nokton ĉe Christian kaj Torstein.

Ekstera mono

Jam en 2009 GET registriĝis en Enhetregisteret kaj Frivillighetsregisteret en Brønnøysund, kaj ricevis la organizan numeron 994 914 146. Ni ankaŭ membriĝis en Grasrotandelen, kaj ekrajtis ricevi monon de Norsk tipping se iliaj klientoj volas. Dum 2012 Norsk tipping pagis al la klubo 1816 kronojn (parte gajnitajn en 2011). La klubo ankaŭ membras en Studieforbundet Næring og samfunn, kiu dum 2012 pagis al la klubo 3790 kronojn.

Postenoj

Estraro dum 2012, elektita de la Jarkunveno la 21an de februaro 2012
Prezidanto: Torstein Kvakland (reelekto)
Kasisto: Ulf Stenhaug (reelekto)
Sekretario: Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)
Estrarano: Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto: Christian Fossen (reelekto)

Aliaj enklubaj postenoj, elektitaj de la Jarkunveno la 21an de februaro 2012
Revizoro: Jørgen Åldstedt (reelekto)
Vicrevizoro: Arne Olav Mjøen (reelekto)
Kunordiganto de la vortara projekto: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)
Elekta komitato: Jørgen Bosoni (reelekto, sed ne formale klubano) kaj Arne Olav Mjøen (reelekto)

Estraraj postenoj de klubanoj (NEL, NJE) dum 2012 post la Landa Kunveno en junio 2011
Prezidanto de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Vicprezidanto de NEL: Ulf Lunde (loĝanta en Os en Hordaland)
Vicrevizoro de NEL: Ulf Stenhaug
Anstataŭanto al la estraro de NEL: Arne Olav Mjøen
Estrarano de Legaco Uhlen: Arne Olav Mjøen
Estrarano de Legaco Uhlen (ekde 2012): Torstein Kvakland
Persona anstataŭanto por Torstein Kvakland en Legaco Uhlen (ekde 2012): Judith Parelie Abrahamsen

Aliaj eksterklubaj estraraj postenoj de klubanoj dum 2012
Prezidanto de Akademia Esperanto-Forumo: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Estraranoj de Akademia Esperanto-Forumo: Herman Ranes, Kjell Heggvold Ullestad

Aliaj eksterklubaj postenoj de klubanoj dum 2012
Elekta komitato de NEL: Herman Ranes
Domkomisionanoj por NEL: Torstein Kvakland, anstataŭanto Herman Ranes
Redaktoro de la TTT-paĝaro de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Gazetara Servo de NEL: Torstein Kvakland
Komisiono de NEL pri radio kaj televido: Christian Fossen
Komitatano A de UEA: Torstein Kvakland
Kunadministranto de la TTT-paĝaro de NJE: Judith Parelie Abrahamsen
Delegito de UEA: Ulf Stenhaug
Vicdelegito de UEA: Torstein Kvakland
Fakdelegitoj de UEA: Ulf Lunde (komputiko, loĝas en Os) kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen (lingviko).
Grafikisto de *Norvega Esperantisto*: Judith Parelie Abrahamsen (muntas nur la frontpaĝon kaj Inter Ni Dirite)
Membroj de la redakcio de la nova vortaro: Jardar Eggesbø Abrahamsen, Herman Ranes, Kjell Heggvold Ullestad.

Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.
Aprobita de la Jarkunveno de GET la 19an de februaro 2013.